

KOMENCANTO

gazeto por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj



Santi Elena Bullo [Mestre, Italio]

115 jaroj de Esperanto

2002

Kiel Trevor Steele, Ĝenerala Direktoro de UEA, iĝis komencanto lirike al printempo — interese pri la virinoj — literatur-historiaj paĝoj por gajaj instruantoj kaj scivolemaj lemantoj — neelpensitaj historioj tempo kaj homoj — aforismoj — anekdotoj — invitoj kaj informoj korespondu!

2

Perantoj de KOMENCANTO

Ĉe tiuj adresoj vi povas aboni nian gazeton

Argentino Argentina Esperanto-Ligo, Casilla de Correo 2910 - Correo Central, AR-1000 Buenos Aires.

Aŭstralio Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

Belgio Flandra Esperanto Ligo Frankrijklei 140, BE-2000, Antwerpen

Brazilo Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, Brasilia (DF) - BR - 70084-970

Britio Esperanto-Asocio de Britio, Wedgwood Memorial College, Barlaston, Stoke-on-Trent, ST12 9DG.

Ĉeĥio Vladislav Hasala, A.Dvorĥka 1, CZ-696 62 Strŕznice

Danio Revusero de Dana Esperanto-Asocio Frederik Eriksen, Finsensgade 10, DK-4800, Nykobing F.

Estonio Virve Ermits, Mahla 65 — 1, EE — 0012, Tallinn

Finnlando Heta Kesala, Kalamiehenkuja 3 D 32, FI-04300, Tuusula

Francio ~ Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004, Paris.

~ R.Melo, 34, Av. de Russie, FR-03700, Bellerive S/A

Germanio Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse, 9 D-55129 Mainz.

Hispanio Pablo Vicente Valero, adv, Obispo Quesada n=BA14, 6D, ES-40006, Segovia.

Irano Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, TEHRAN

Italio Itala Esperanto Federacio, Via Villorosi, 38, 20143, Milano.

Italio, Kroatio, Slovenio

Viŝnja Brankoviĉ, Via Leghissa 6, IT-34131, Trieste

Katalunio Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 290, ES-08200, Sabadell

Kubo Lazaro Azcuy Ravelo, str. 25 #5611 c/56460 Playa 11300, HAVANO

Litovio Litova Esperanto-Asocio, LT-3000, Kaunas, ab.k. 167.

Norvegio Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schous vei 18, N-0572 OSLO

Pollando Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskiego 77-137, PL-01-865 Warszawa

Svedio SEF, Lisbet Andreasson, Sodra Rorum pl 455, SE — 24294 Horby

Svislando Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH — 4224 Nenzlingen

Usono

Esperanto Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El Cerrito, California 94530, U.S.A.

redakcie

Karaj legantoj!

Jen estas la dua kajero de "K-2002". La kovrila paĝo memorigas al vi, ke en ĉi tiu jaro estas malgranda jubileo por nia kara lingvo – 115 datreveno ekde la apero de la unua lernolibro de Esperanto. Por ambaŭ eksteraj paĝoj la bildojn pentris *Santi Elena Bullo*, Mestre, Italio.

Ni daŭrigas rakonti pri tio, kiel la famaj esperantistoj iĝis komencantoj. *Trevor Steele*, nova aganta Ĝenerala Direktoro de UEA prezentas sian sperton. Daŭre vi trovos originalan lirikan noveleton de *Nikonov Sergeo* el Rusio pri printempo kaj poetika inspiro. Por la unua fojo publikiĝas en nia revuo *Jong Hueon Ju* el Koreio, ŝi rakontas pri sia sperto de okupado pri Esperanto.

Rakonto pri la vivo de Nikolao Hohlov kaj liaj brilaj versaĵoj estas ĉi-numere sur la literatur-historiaj paĝoj. Daŭriĝas niaj novaj rubrikoj "Neelpensitaj historioj" kaj "Tempo kaj homoj". Ĉe la Amuza Gramatiko estas nova por "K" nomo – *Vŝivceva Tatjana* el Rusio. Poste sekvas la plej tradiciaj niaj rubrikoj — Aforismoj kaj Anekdotoj.

Nova paĝo "Invitoj kaj Informoj" jam la duan fojon prezentas diversajn renkontiĝojn kaj eventojn en Esperantujo. Korespondadreso kiel ĉiam fermas la kajeron.

Bonvolu fiksi nian novan retadreson

<komencanto@r66.ru> kaj sendi al ĝi viajn verkojn.

Agrablan legadon!

Viaj donacoj por KOMENCANTO ĉiam bonvenas!

KOMENCANTO

2002 numero 2 // (34) // 6 numeroj jare
regule aperas ekde 1997

redaktas kaj eldonas: Viktor Kudrjavcev

konstanta kunlaboranto: Rafija Jafasova

adreso:

620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Rusio

retpoŝto: komencanto@r66.ru

abontarifo por 2002:

internacia tarifo: 15 eŭroj aŭ \$15;

orienteŭropa kaj latinamerika tarifo: \$13;

aŭ por ĉiuj — 16 IRK

konto ĉe UEA: ukud-a

rusia tarifo: 120 rusiaj rubloj poŝtmandate al:


Кудрявцев Виктор Васильевич, 620041,

Екатеринбург, аб. ящ. 132.

Oni rajtas uzi bildojn kaj verkojn el "K".

La sola kondiĉo - nepre menci KOMENCANTO'n, la nomojn de la aŭtoroj kaj ties loĝlokojn.

Esperanto de tiam tenadas min. Por mi ĝi prezentas unu el la ŝlosiloj por konstrui pli feliĉan vivon tutplanedan.



Eĉ kiel knabeto mi estis fascinata de fremdaj lingvoj. En nia absolute unulingva aŭstralia vilaĝo mi estis, mi kredas, vera esceptulo. Kaj kiam mi ekloĝis en internulejo, kie oni instruis la latinan, mia intereso kreskis. Retrospektive mi supozas, ke amo al tiu antikva lingvo estis integra parto de la unua ideologio de mia vivo, mia aneco en la Katolika Eklezio. Kvankam mi nun rigardas tiun eklezion ne unika, sed same historia kreskaĵo kiel multaj aliaj, la teoria internacieco de la mond vasta organizo kun centro en Romo kaj kun internacia pontlingvo lasis neforviŝeblajn spurojn en mia pensmaniero. Mi restis katoliko nur ĝis la tempo, kiam mi ne plu povis kredi, ke ĝi superas ĉian ajn naciismon aŭ limigan apartismon.

En mia gimnazio eblis lerni nur la latinan kaj iomete la francan. La germana, la lingvo de la iama milittempa malamiko, ne estis instruata. Stulte, ĉu ne, rifuzi lerni la lingvon de la "malamiko"? Ĉu tiel oni punas la malamikon aŭ sin? Eble pro tio, ke mi devis alproprigi la germanan propraforte kaj ne per rutina lerneja sperto, ĝi pli influis mian vivon ol la aliaj lingvoj.

Post kelkaj jaroj kiel instruisto mi interrompis mian karieron en Aŭstralio kaj iris al Germanio labori diverskampe (vi povas legi pri tio en mia romano *Neniu ajn papilio*). En tiu lando mi daŭre akiris novajn lingvajn spertojn. Kiam mi trans-

loĝiĝis al la lando de duono de miaj praŭloj, Anglio, atendis min diversaj interesaj spertoj, sed lingve nenio nova. Evidente la "Sorto" elektis tiun tempon por konatigi min kun Esperanto.

Komence estis nur lingva intereso. Mi sciis, ke lernado de nacia lingvo postulas jarojn da diligento kaj amo. La unua prezento de Esperanto, kiun mi aŭdis, estis ne lerta, sed mi kaptis la ideon: substantivoj finiĝas per -O, adjektivoj per -A, verboj per diversaj neŝanĝeblaj kaj tre simplaj finaĵoj. Nu, jes, tia reguleco estas neimagebla en naciaj lingvoj: sed ĉu tiel simpligita lingvo povus vere funkcii? Ĉu ĝi ne estus monotona kodo sen literaturaj ebloj?

Tiu kolegino en mia lernejo (en Dagenham, apud Londono) kiu enkondukis min al Esperanto, tre ĝojis, kiam mi petis lernolibron. Dum unu semajno mi dediĉis ĉiuvespere eble duonhoron al la projekto, kaj trovis la lingvon nekredible facila. Ĉar mi jam pli-malpli konis la lingvojn (krom la rusa), el kiuj Zamenhof tiris sian vortstokon, mi faris divenludon: kiel oni esprimu la nomon de tiu ĉiela korpo, kiu donas al ni lumon: ĉu *solo* (el la latina/franca radiko), ĉu *sono* (laŭ la germana Sonne), ĉu *suno* (la angla radiko)...?

Nu, la lingvo ja funkciis, sed kio pri literaturo? Kial oni lernu lingvon, se neniu uzas ĝin por esprimi pensojn kaj emociojn? Mi iris al la librovendejo de la Brita Esperanto-Asocio kaj demandis, sendube arogante, "Ĉu via lingvo produktis ion ajn, kio pravigus la peneton lerni ĝin?" La vendisto rigardis min iom ridete (estus interese scii, kia li juĝis min!). Li surtabligis antaŭ mia nazo *La infana raso* de iu skoto. Ne ĉies unu legaĵo... Mi iris al mia apartamento kaj lasis William Auld paroli al mi (kompreneble, mi tre ofte devis enmanigi vortaron). Jes, la homo estis talenta, kaj jes, oni povas esprimi tre interesajn ideojn per la lingvo, tio estis klara.

Ambicujo, mi decidis, ke ankaŭ mi uzos la lingvon sur literatura nivelo. Mi tradukis la biblian 23-an

psalmon, kies beleco estas sentempa, kaj ĉapitron el elstara romano de la aŭstralia aŭtoro Thomas Kennelly (ĉefe konata pro *La arkeo de Schindler*, sed li verkis pli bonajn). Mi estis tre malĝentila: eksciinte, ke estas esperantisto en apuda parto de Londono, mi simple sendis al li mian dikan koverton kaj petis lin kontroli miajn majstraĵojn. Kelkajn semajnojn poste revenis la koverto. La psalmo estis ĉie ruĝe korektita, la ĉapitro de Kennelly estis pure blanka. Hej, kiel povas esti? Baldaŭ mi divenis la kialon. La korektinto prenis la oficialan version de la Biblio, kaj kie mia traduko iel malsamis, li trastrekis. Ne estas traduko de la romano, do li ne "korektis"... Mi fakte hontis, ĉar evidente la peto estis embarasa por tiu kompatindulo.

Intertempe iel disvastiĝis la informo, ke juna instruisto eklernis la lingvon, ĉar aliurba lernejestro, Raif Markarian, telefonis kaj proponis senpagan transporton per aŭto al Universala Kongreso de Esperanto en Vieno. Mi neniam antaŭe sciis, ke tiaj kongresoj okazas, sed Vieno estis tre vizitinda urbo, do mi emis jesi. Sed Raif donis al mi kondiĉon: mi devos paroli nur esperante dum la tuta veturo. Aj! Ĝis tiam mi diris dum du-tri semajnoj? Mi petis "pripensotempon". Raif konsentis: post du tagoj li ree telefonos, kaj mi diru aŭ jes, aŭ ne. Tuj mi komencis skribi rudimentajn frazojn kaj provis imagi konversaciojn. Du tagojn poste la telefono tintis. Iom hezite mi diris, "Je-es".

Nun mi dankas Raif pro lia obstino, sed en 1970 vere estis streĉe devi paroli kaj pensi en lingvo ĝis tiam nurpapera. Ni traveturis Sundanglion, Francion, Svision kaj grandan parton de Aŭstrio kvarope: Raif, lia filino Ĝoja, Chris Fettes (ankaŭ li estis relative nova esperantisto tiutempe). Foje Chris kaj mi sukcesis forŝteliĝi dum veturpaŭzoj kaj uzi la malpermesatan anglan...

Trevor Steele

(Pri mia esperantisteco — fino)

Krom tio ni parolis, manĝis, trinkis esperante, eble eĉ koŝmaris.

Nu, jes, ni parolis la lingvon, sed ne tre elegante. Kiam oni devas unue analizi la frazojn de la aliaj kaj poste "skribi" respondon sur imaga tabulo kaj poste laŭtlegi ĝin, la rezulto ne ĉiam plaĉas. Ĉu vere eblas flue paroli lemitan, sed ne ĉiutagan lingvon?

Vieno, la kongresejo, la tago de la inaŭguro. Iu sinjoro kun aspekto de naskita estro aliris la podion. Iom poste li ekparolis, kaj ĉiuj aliaj silentis. Ho dio mia, kiel la homo oratoris! Longaj ruliĝantaj frazoj, sed tiel klare prononcataj kaj konstruitaj, ke mi, novulo, komprenis ĉiun vorton. Lapenna parolis dum eble dudek minutoj. Mi ne memoras, ĉu ĉiuj ekstaris por aplaŭdi lin, sed oni sentis tenton tiel esprimi sian admiron. Li konvertis la materialon de elpensita lingvo en artformon.

Sendube eĉ tiu sinjoro Lapenna estis iam komencanto: do ankaŭ mi komencu. Iom nervoze tranĉinte miajn sekurecliniojn, mi ekbabilis kun homoj rande de la grupoj. El kiu lando vi venas? En kiu urbo vi loĝas? Kiel vi venis al Vieno? Pardonu, kioma horo estas? Ĝu vi havas gefilojn? Ĉu vi estas kontenta pri via hotelo? Mondskuaj temoj, certe, sed ia interŝanĝo de informoj jam okazis.

Dum tiu semajno mi tre rapide progresis pri la lingvo. La ideologion mi apenaŭ atentis, ĝis eble la lasta tago. Tiun tagon mi longe babilis kun japano. Kiel mi diris aliloke, japanoj estas por aŭstralianoj kvazaŭ simbolo de lingve neatingeblaj fremduloj. Ili iras amase al Aŭstralio kiel turistoj, sed interparolo estas ege malofta. Japanoj nebone kaj ofte nevolonte parolas angle, kaj aŭstralianoj kutime parolas nur angle. Sed jen mi estas en Vieno, parolante kun homo, kaj nur kiam li foriris mi rimarkis: Ha! Li estas japano, kaj mi konsciis nur, ke li estas homo. La pontolingvo forŝisis la fremdecon. Esperanto estas pli ol nura lingvo, ĝi esprimas nian deziron esti solidaraj kun niaj samspecianoj, kia ajn estu ilia origino.

Esperanto de tiam tenadas min. Por mi ĝi reprezentas unu el la ŝlosiloj por konstrui pli feliĉan vivon tutplanedan.

Terjofina Maŝa [Uljanovsk, Rusio]



Esperantigis
Nikonov Sergeo
[Zavodskoje, Rusio]

Inspizo

Mi sidis en la sufoka ĉambro, penis verki versojn, sed hodiaŭ ĉe mi nenio rezultigis.

Kaj ĉe la strato regis printempo. Hele brilis la suno, sur la ĉielo ŝvebis blankaj nubetoj, la kokinoj paŝis en la korto. La kato varmiĝis sub la sunradioj. Sur la benko sidis avinoj, similaj al la kokinoj. Kontentaj pri la suno, ili trankvile konversaciis.

Nu, kial en tia tago ne verki versojn? Pri la amo, pri feliĉo. Aŭ simple pri tiuj avinetoj?

Sed vane, nenio aperas el sub mia plumo, mankas inspiro.

Mi kuŝis sur la divanon. Mi kuŝis kaj rigardis tra la fenestro al la naĝantaj nubetoj.

Subite oni frapis la pordon. Mi malfermis ĝin.

Ho, miraklo! Antaŭ mi en la kurta blanka robo staris junulino ĉirkaŭ deksesjara, neordinare bela kaj svelta, kun bluaj okuloj, helaj haroj, kuŝantaj sur ŝiaj ŝultroj. Ŝi havis agrablan nazeton kaj fajnajn lipojn.

Ŝi simple eraris pri la pordoj. Ŝi demandis, ĉu mi scias, kie loĝas tiu, kiun ŝi bezonas, kaj foriris.

Sed mi memorfiksitis ŝian vizaĝon. Mi staris kaj rigardis al la malfermita pordo kaj ridetis.

Poste mi fulmis al la tablo, kaptis la krajonon. Kaj ekfluis la versoj kvazaŭ rojoj.

Mi komprenis, kio al mi mankis por verki versojn. Beleco. Virina beleco.

Por estu vivo interesa mem faru paŝojn al progreso!

Jong Hueon Ju

[Busan, Koreio Suda]

Nia legantino Jong Hueon Ju el Koreio sendis al la redakcio kiel sian unuan provon por publikigo priskribon de ŝia viva sperto. Tiu priskribo entenas ankaŭ konsilojn por la virinoj, kiuj dume hezitas pri la olupo kaj praktika apliko de Esperanto. Do, akceptu ankaŭ tiun formon de memesprimo.

Antaŭ malpli ol du jaroj, mi fariĝis esperantisto. Mi estis tia homo, kiu tute ne sciis pri Esperanto. Mia esperantistiĝo ŝajne estis pro ia hazardo — tamen tio efektive estis ne tute tia, laŭ mia sento.

Iam antaŭe mi estis absorbita je pentrado, legado kaj budhaismo. Mi pensas, ke la pasio en mi kondukas min laŭ sia ĝusta vojo.

Kiam oni trovas ion bongustan, oni ekimagas sian amaton por manĝi kune. Al dom-mastrino, tiu amato plejeble estas la edzo aŭ la gefiloj.

Se la bona trovaĵo ne estas manĝaĵo, sed estas io, kio plibonigas kaj riĉigas la kvaliton de vivo, oni volas rekomendi ĝin al ĉiuj najbaruloj, kaj do volas komune posedi la ĝojon. Eble pro tio religio pli facile propagandiĝas.

Kiam mi estis mez-30-jaraĝa, vidinte la abruptan morton de du parencoj pro trafikakcidento, mi vizitis budhaisman templon sola, kvankam antaŭe mi estis tute ne interesita pri religio.

Kaj mi studis la budhaismon, de la dogmo ĝis meditado.

Kvankam mia studo estis ne tiel profunda, mi faris la plian klopodon je la studo, kaj laboris en la agado de la templo.

Pro ironia fakto, ke mia aspekto ŝajne ne konformas kun budhaismo, mia propagando efikis, kaj pro la manko de junuloj en la templo mia agado relative brilis. Laŭ mia sperto, estis ne tiel facile rekomendi studon de budhaismo al miaj najbarulinoj kaj amikinoj, tamen tio estis pli facile ol pri Esperanto.

Eble tio estas pro la fakto, ke ili sentas, ke budhaismo helpas al ili por la feliĉo de iliaj familioj, aŭ por la sukceso de iliaj edzoj, aŭ la sukceso de la alproksimiĝanta ekzameno de la filo en universitato.

Ni povas atribui tian emon al dom-mastrina sindonemo al sia familio. Studinte Esperanton, mi sentis la saman ĝojegon kiel de la budhaismo, kaj mi provis rekomendi Esperanton al najbaraj konatoj.

Preskaŭ ĉiuj reagoj estis en tri kategorioj. La unua — malgraŭ la vera bono de Esperanto, ili tute ne havas volon ree studi tion, kio enhavas anglan alfabeton.

La dua — ili konsentas, ke esperanto ĝojigas la vivon, kaj ili havas volon studi ĝin, sed ili antaŭvidas, ke tute ne povus ĝui kaj utiligi ĝin, ĉar al ili tute ne eblus eksterlanda vojaĝo, kaj ili ne povus partopreni iun ajn kunvenon internacian pro hejmaj devoj. Do ili sentas, ke lerno de Esperanto tute ne valorus.

Kaj la tria — ili simple ne havas tempon por studi ion ajn.

Ĉiuj homoj el la tri kategorioj ne havas eventantan celon — motivon por studo.


Do estas tre malfacile esperantigi tiujn homojn, kaj ili rezignas Esperanton post vere mallonga tempo.

Sen klopodo venas nenio. La tempo estas fleksebla, kaj dependas de ies volo. Oni povas mallongigi tempon por televido, telefonado, butikumado aŭ eĉ dom-mastrumo.

Mallongigante tiajn aferojn, oni povas havi almenaŭ unu horon.

Kaj ili ĉiam aldonas jenan mencion: "Vi povas fari ion ajn, ĉar vi havas afablan edzon. Sed mi ne". Ĝuste tiaj vortoj kolerigas min. "Kial lerno rilatas al edzo?"

Lerno de Esperanto tute ne malhonorigas la familian noblecon, tute ne malmultigas la vivokoston, kaj tute ne neglektigas la dom-mastrumon. Malgraŭ tio, ili serĉas pretekston en siaj edzoj.



Terjohina Maŝa [Uljanovsk, Rusio]

Eĉ ne pri Esperanto, mi koleras kiam mi vidas inojn, kiuj nenion faras por si mem, pretekste de siaj edzoj.

Mi komprenas bone, ke multas indulgemaj viroj, sed bedaŭrinde multas edzoj indulgemaj. Ŝanĝi la edzon kaj la edzan ideon estus malfacile, tamen mi certas, ke oni unue povas ŝanĝi sin mem kaj la edzo ŝanĝiĝos iom post iom.

Edzoj kutime kontraŭas hobion de sia edzino, ĉar la edzino ne sindonas al la hobiaj plejklopode. Pro la neglektema konduto de la edzinoj, la edzoj facile pensas, ke la edzina hobia estas bagatela.

Se ni, inoj, montrus tiom da diligento, ke la entuziasmo impresus la edzojn, la edzoj ne povus kontraŭi malprudente.

Kaj la edzoj streĉiĝus kaj klopodus por progreso laŭ la progresantaj edzinoj.

Mia edzo estas ne malsama ol aliaj edzoj. En la mondo apenaŭ troviĝas tia edzo, kiu ŝatas gastigi eksterlandanojn, kies lingvon li ne komprenas, forlasi hejmon por kongresoj, aŭ voaĝi eksterlanden sen familio.

Preskaŭ dum du jaroj mi studis Esperanton kun la malplaĉo de mia edzo. Ĉiun fojon, kiam mi vojaĝis eksterlanden kaj partoprenis eventojn diversajn, mi devis fari psikologian militon kun mia edzo, sed mi ne rezignis ĝis la fino, ĉar mi ne volas perdi mian estonton feliĉan por plaĉo de mia edzo.

Mi ankaŭ spertis tian malfacilon, kiam mi volis partopreni Universalan Kongreson, tamen mi finfine ricevis la permeson por ĉujara partopreno.

Virinoj, vi imagu: post longa kunvivado vi dirus al via edzo, ke vi nenion atingis en la vivo pro la familio. Tiam vi certe aŭdos la riproĉon, ke la kaŭzo de la situacio estas nura via maldiligento...

Karaj inoj, ni vivu pli fervore!

Beligu vian veston pli ol la domon,
Heligu vian haŭton pli ol la veston,
Purigu vian sangon pli ol la haŭton,
Briligu vian koron pli ol vian sangon,
Varmigu vian animon pli ol la koron!

La dua periodo de esperanta literaturo

*Sovetaj
verkistoj*

Karaj legantoj!

Ĉi foje ni volonte prezentas al vi ankoraŭ unu el sovetaj verkistoj de la dua literatur-historia periodo. Tio estas Nikolao Hohlov, kiu eniris en la historion de E-literaturo kiel eminenta poeto.

Li havis malfacilan homan sorton kaj lia vivo estis plena de dramateco.

Nikolao Hohlov

naskiĝis la 31-an de januaro 1891 en Moskvo. Kiel li mem skribis, li naskiĝis "je kvaronversto de la muroj de Kremlo", kaj lia infaneco pasis en ludoj inter ĝiaj muroj.

En Moskvo li lernis en gimnazio, poste finis komercan lernejon kaj eklaboris en Moskva Ĉefpoŝtejo. Li esperantistiĝis en 1905, en la jaro de la unua rusa revolucio. Fortaj impresoj de tiu tempo poste trovis sian respegulon en lia versaĵo "1905". N. Hohlov aktive propagandis Esperanton, en 1912 li dissendis milojn de propagandiloj per oficiala poŝto al ĉiuj anguloj de Rusio; en 1917 li gvidis kursojn de Esperanto en speciala poŝttelegrafa lernejo.

Dum la jaroj de la Oktobra Revolucio, N. Hohlov konatiĝis kun sia estonta edzino Vera. En 1918 ili ambaŭ forlasis Moskvon kaj forveturis Poltavon, kie oni mobilizis Nikolaon en blankan (kontraŭrevolucion) armeon. Lia edzino Vera, kiel polino, sukcesis elmigri al Varsovio en 1919. En 1920 mem Hohlov ekmalsanis je tifo. Lin kun ĉiuj aliaj malsanuloj oni metis en ŝarĝvagonon kaj veturigis for. Estis malvarma aŭtuno, kaj certe preskaŭ ĉiuj malsanuloj mortis. Nikolaon savis miraklo. Kiam li rekonsciĝis en la vagono, li ekaŭdis anglan parolon, do estis trovita kaj savita fare de angla Ruĝa Kruco. En novembro 1920 ŝipo "Herson" veturigis jam lin for de Patrujo, ĝis insulo Malto. Tie al la elmigrintoj estis proponita elekto — veturi al Italio, Grekio aŭ Jugoslavio. Hohlov elektis la lastan. En la printempo 1921 li jam laboris kiel ŝarĝportisto en la haveno de urbo Bakar, iom poste li translokiĝis en Zagrebon, kie tuj post la alveno iĝis aktiva membro de Zagreba esperantista rondo. Li estis kunfondinto de la unua postmilita Esperanto-gazeto "La Provo" en Jugoslavio, poste iĝis ĉefa kunlaboranto de gazeto "Konkordo".

Hohlov estis ankaŭ kunorganizanto de la unua Jugoslavia Esperanto-kongreso en Zagrebo (1923), por kiu li verkis originalan komedieton "La morto de la delegito de UEA", eldonitan en Zagrebo en 1924.

Lia edzino Vera en 1921 ankaŭ venis Zagrebon kie naskiĝis ilia unua filo — Juliusz. Sed nostalgio pri Polujo instigis Vera reveni al Polujo; plenumante ŝian deziron, Nikolao veturis kun ŝi en Varsovion. Sed nek laboron li tie povis trovi, nek la pola registaro permesis al li resti en la lando pli ol unu jaron. Do, li revenis al Zagrebo sola, ĉar la edzino ne volis forlasi Polujon.

En Zagrebo li denove enprofundiĝis la esperantistan vivon, aktive okupiĝis pri literatura laboro. Li multe tradukis, studis poezian arton, kaj plimulto de liaj versaĵoj, kolektitaj en lia ĉefverko "La Tajdo", verŝajne estis kreitaj tiam. Li kunlaboris ankaŭ en "Literatura mondo", kie publikigis siajn lingvajn artikolojn, rakontojn kaj tradukojn kutime sub la pseŭdonimo "Skito". Tradukis N. Hohlov el la angla, rusa kaj serba lingvoj. Sub lia plumo aperis sekvaj sukcesaj tradukoj: "Krucumo" de Drozdov (1922), "Orientaj fabeloj" de Doroŝevič, (1928), "La Morto de Danton" de Aleksej Tolstoj (1928), "Historio de la Mondo-lingvo" de Ernest Drezen (1928).

N. Hohlov tre amis Zagrebon, amis naturon de Kroatujo, li perfekte parolis kroate, eĉ sciis dialektojn de tiu lingvo kaj ofte, veninte al vilaĝoj, parolis kun lokaj loĝantoj en ilia propra dialekto. En la leteroj al sia multjara korespondantino, fama Esperanto-poetino Hilda Dresen li skribis:

"Jes, mi ŝatas, mi amas Zagrebon, malgraŭ mia tuta natura nostalgio pri la Nordo — tiuj du sentoj miksitaj kune sonorigas strangajn kordojn en la animo. Neniame en Rusujo mi vidis sunsubiron, similan al la ĉi-tieaj! Kaj tiuj gajaj montetoj, krispiĝantaj per la vinberaj plantetoj! Sed la penso pri Rusujo estas dominanta — neevitebla". Tia neevitebla nostalgio kaŭzis fin-fine decidon reveni en la Patrujon. En 1928 li por ĉiam forlasis Jugoslavion. Li veturis tra Varsovio, kie renkontiĝis kun sia edzino kaj provis konvinki ŝin veturi kun li, sed vane.

Tuj post sia reveno al Moskvo, Hohlov komencis aktivan Esperanto-agadon: oni elektis lin kiel gvidanto de

literatura sekcio en la lingva komisiono, poste li iĝis la ano de la Lingva Komitato. Li multe tradukis, sed originale verkis jam malmulte: estas sciata nur unu versaĵo, kiun li verkis post la reveno — tio estas "Viburno". En kolekto "Arĝenta duopo" aperis lia artikolo pri "Preter la vivo" de Ju. Baghy.

En tiuj jaroj Hohlov laboris kiel ekonomiisto. En 1930 li denove edziĝis, kaj en 1931 naskiĝis lia dua filo — Leonid.

Dum la jaroj de la Dua Mondmilito Hohlov kaj lia tuta familio veturis kun aviadiluzino, en kiu li tiam laboris, al Taŝkento, (Uzbekio). En Taŝkento li serioze ekmalsanis, kaj en 1944 li revenis Moskvon jam kun rompita sano. Kvankam li same interesiĝis pri Esperanto, sed jam malmulte povis fari. De tiu tempo restis nur traduko de "Himno de la demokratia junularo" (1948).

En 1952 N. Hohlov suferis apopleksion, post kiu vivis nur kelkajn monatojn kaj mortis la 26-an de februaro 1953.

Malgraŭ ke literatura heredaĵo de N. Hohlov estas modesta laŭ la amplekso, sed ĝi tre valoras laŭ la profunda enhavo kaj brila arta formo. Kiel moton por sia ĉefverko "Tajdo" la verkisto prenis la komencan verson de "Art poétique" de la franca simbolisma poeto Paul Verlaine: "De la musique, avant tout chose..." (Vi devas havi muzikon antaŭ ĉio) kaj ĉiu lia verso havas kvazaŭ muzikan subtekston, iun akompanantan melodion. Laŭ atesto de lia amiko Ivo Rotkvič, Hohlov kutime fajfis melodiojn, kaj sub la sonoj aperadis rimoj kaj versoj. Estas sciata ankaŭ el liaj leteroj al H. Dresen, ke li studis literaturon pri muzikeco de versoj. Eble ĉio ĉi helpis al la verkisto krei tiom muzikecajn versojn.

La temaro de Hohlov estas tre vasta: belegaj amaj versaĵoj, filozofiaj meditoj, brilaj ekzemploj de politika liriko, ĉarmaj ŝercaj versaĵoj — ĉiam li trovas novajn formojn por arta esprimo de liaj pensoj kaj sentoj, trovas freŝajn rimojn, kiuj ravas nin.

Sian kredon la poeto esprimis en la verso "Mia vojo", en kiu li diras, ke lia rigardo estas celita en ĉielon, sed piedoj firme staras sur la tero kaj lia celo estas idealoj — paco kaj libero, kiuj regos en la mondo.

Mia vojo

(fragmento)

Mi levas mian kapon en ĉielon,
Sed per piedoj staras sur la ter',
Nur idealojn vidas kiel celon,
Sed nutras min per krudreala ver'.

Sur montoj kreskas mia sorĉa floro,
Sed en la valoj kreskas mia pan',
Altiras la animon ĉiu floro,
Sed ankre tenas ĝin la karna man'.

En alia poemo "Chante – claire" la aŭtoro rigardas
sin kiel vekanton, kiu egaligas al koko kaj salutas
"ĉiun aŭroron":

"Poeto kaj koko anoncu
al-venon de ĉiu aŭroro!"

Ne gravas ke estas "tro frue", ke ne multaj
ankoraŭ aŭdas la vekon kaj ne multaj komprenas la
veron de la versoj de la poeto, kiun ĉiam zorgigis kaj
la sorto de lia Patrio, kaj la sorto de la tuta homaro.

Multon ni povus ankoraŭ citi, vortojn kaj versojn
de N. Hohlov, sed ni proponas al vi tralegi sube
prezentitajn kelkajn plej konatajn liajn versojn kaj al vi
mem konstati nivelon de sendube interesa kaj pro-
fundsenta poeto.

Viburno

Ĉe serpentuma rivera turno,
ombrante ŝtonojn de moska put',
en la umbela ornam' viburno
sunumas branĉojn sur verda krut'.

Mi ne forgesis — mi ĝin rekonas,
la kamaradon de l' fora jun';
en la animo revive sonas
la pasinteco tra l' muta nun.

Ĉu ne hieraŭ la varman manon
glacie brogis la akva skvam',
kaj lipoj trinkis la mirĉampanon
sub la tintado de l' guta gam'?

Ĉu ne hieraŭ la koro saltis
pro la senbrida plensanga puŝ',
ĉu ne hieraŭ apenaŭ haltis
en kantebrío la arda bus'?

Kun la freŝeco de la hieraŭ'
tre zorge gardis la fida kor'
ĉi tiun puton ĉe la rivero
kaj la viburnon en la memor'.

por ĉe l' revido dolore sveni
en skua ondo de la pasint',
kaj, sveniĝante, rezigne beni
la gutoplendojn de l' plaŭda tint'.

Vintra fabelo

Sur la sledo, svelta sledo, post amuza kabaredo,
Kun tintila sonorad'
Ni veturas — aventuras, la ĉevaloj fluge kuras
Sub la stela miriad'.

En sereno de l' ebena malaperas la fadeno
De la glata vintra voj'...
Nia Nita — am' subita, de la frost' ebrigiĝita
Alpremiĝas en la ĝoj'.

En fabelo kaj sen celo rotacias karuselo
De la sentoj en la kor',
Hej, rapide kaj senbride flugi ien, flugi fide
Kun favoro de Amor'!

Hej ĉevaloj, hufaj ŝtaloj, kiel rido de cimbaloj
Por dancanta ciganin',
Uraganu, akompanu, dolĉe tiklu, ĝutiranu
Per freneza takto nin!

Brila neĝo — vintra reĝo — ĉion tenas en sieĝo,
Gaje ĉirpas en la knar',
La survoja vento ĝoja en malklara gam' hoboja
Vokas, logas al kampar'.

Unu suno — unu juno... la unua febra kuno
Kaj magia stelpoem'...
Mia Nita, am' subita, de la frosto rozkisita
Ĉion kronas per alprem'!



Vinnikova Nina [Novoaltajsk, Rusio]

Leksina Ludmila

[Sudja, Rusio]

Besta alfabeto

*Datigo. Komenco (A,B,C)
en la numero 8-2001
Ĉ, D, E, F en 1-2002.*

G

Grumblema gorilo
gibonon gastigas.
Galanta gazelo
gepardon gajigas.
Gubernas groteska gruino.
Galopas gracia gnuino.

Ĝ

Ĝentila ĝerboso ĝemas,
Ĝin ĝirafo ĝenas.

H

Hipopotamo hufobatas —
Hastas horora hirudo.
Hipopotamo henas: "Hura!" —
Helpas herkula hirundo.
Hurlas hommanĝanto – hieno.
Hororas hamadriado.
Haltigas hororon hamstro.
Hamstro havos honoradon.

I

Iam ie ial iu
Imitadis ies idon.
Izatiso imponema
Inpresemas invalidon.

Por gajaj instruantoj

Makarenko Vladimir [Tverj, Rusio]
komencanto

Unua provo

Unua provo ĉiam malfacilas,
Sed ĉiu devas fari ĝin.

Alie povas vi neniam
Ekscii: ĉu kapablas vi?

Mi ankaŭ sidas kaj skribanta
Senordan tiun ĉi verset'.
Esperas mi, ke la legantoj
Pardonos pro l' eksperiment.



Perevalov Jurij [Lesnoj, Rusio]

Konsiloj de VikS

VikS=Viktor Sapojnikov [Jalutorovsk, Rusio]

Konsiloj al komencantaj esperantistoj

1. Se el la 26.000 vortoj de Bokarjev-vortaro vi uzas nur 26, diru, ke vi finis studi la lingvon antaŭ unu jaro.
2. Se vi ne komprenas prelegon de la spertulo, ne sidu ŝtonsimile. Kapbalancu diskrete ĉe la 14, 29, 37, 63 kaj 97a minutoj.
3. La spertulo vin demandas: "Ĉu vi havas falkon aŭ kaliopon?" Ne rapidu kapjesi aŭ kapnei. Respondu, ke vi forgesis la vortaron hejme.

(En la sekva "K" – Konsiloj al spertuloj)

kaj scivolemaj lernantoj

Všivceva Tatjana [Miass, Rusio]

Ĉiu scias, ke nia ortodoksa E-gramatiko enhavas 16 regulojn. Kutime en lernolibroj ajna gramatika regulo havas krom la determino ankoraŭ ekzemplojn. Ankaŭ en Gaja Gramatiko ekzemploj akompanas determinojn.

Gaja Gramatiko

1. Estas “-o” en nia vivo
La finaj’ de l’ substantivo.

-o-

Lando, barbo, patro, mondo,
Meleagro, vagabondo,
Slango kaj aperitivo —
Certe estas substantivo.

2. “-A” –finaj’ sur kamp’ kaj montoj
Ĉiam l’ adjektivon montras.

-a-

Bela, mola, lanta, granda,
Interesa, forta, randa,
Kaj naiva, kaj mistera —
L’ adjektivo estas vera.

3. Se ni multajn aĵojn ŝatas —
Do pluralo bezonatas.

-j-

Gravaj faktoj, bonaj homoj,
Strangaj temoj, novaj domoj,
Vortoj rusaj, vortoj ĉinaj —
Skribu “-j” — pluralon ĉiam.

4. “-N”-finaĵo efektiva
Estas pro l’ akuzativo.

-n-

Vidu arbon, havu monon,
Verku libron, aŭdu sonon,
Kaptu muŝojn, manĝu ion —
Uzu la akuzativon!

5. La adverbon (estas vero)
Finas ni per “-e”-litero.

-e-

Krude, fakte, dokumente,
Nereale, permanente,
Interese, gaje, lerte —
La adverbo estas certe.



Bill Thorne [Londono, Britio]


Dek ordonoj de kursgvidanto

laŭ instruoj de s-ro
Vladimir Opletajev
[Surgut, Rusio]

1. En la kurso la plej grava estas la persono de la instruisto.
2. Ne rapidu en la instruado.
3. Preparu vin bone al ĉiu leclono (por estri la materialon kaj lernantaron).
4. La cerbo bezonas tempon por digesti same, kiel la stomako (diversaj cerboj — diversan tempon).
5. En la parolo oni ne povas vidi la distancon inter la vortoj, kiel en la skribo.
6. La ripetado estas la pralernado.
7. Evitu demandon, frazon, ludon, kiu povus ofendi aŭ ĝeni lun.
8. Faru la laboron elegante por imponi.
9. Amu gelernantojn viajn.
10. Amu laboron vian.

Neelpensitaj historioj

Okazintaj *al* aŭ tradukitaj *de* niaj legantoj



Thorne Bill [Londono, Britio]

La kato

La kato sidis sur la aŭtomobilo.
La hundo manĝis la kolbasojn.
Mi perdis mian pantalonon.
Mi serĉis ĝin en ĉiuj ĉambroj sensukcese.
Ha, mi trovis pantalonon sub la lito.
Kie estis miaj kolbasoj?
Mi devis iri rapide al la laborejo.
Kial ĉiuj kriegis al mi dum la vojaĝo?
Ho, la kato alkroĉiĝis aŭtomobilon; timege.
Ho, la kato tre timis, ĝiaj haroj staris rekte.
Kiam mi karesis lin, ĝi trankviliĝis iomete.
Mi portis ĝin en la oficejon.
Por ĝi mi aĉetis lakton el la trinkmaŝino.
Per la komputilo min atendis ordono de mia ĉefo.
— Ĉu vi povas rememori, kiam mi vizitis

Usonon?

Mi demandis min silente: "Kial li mem ne povas rememori lian viziton, ĉu ebruis?"

Ne gravas: mi estas maljuna soldato — aŭdi estas obei.

Mi serĉis tra la listoj de la firmaaj kunsidoj dum lastaj tri jaroj. Mi serĉis tra la listo denove kaj denove, ankaŭ kontrolis la liston de vojaĝoj.

Dume la kato dormetis apude, kaj nun ĝi vekigis. Ĝi venis al mi tra la skribotablo ronronanta. Ĝi volis manĝi. Ĝia piedo frapis la angulan klavon de mia komputila klavaro.

Samtempe mi tuŝis aliajn klavojn, mi ne sciis kiujn.

Subite sur la ekrano aperis sekreta konfidenca dokumento!

Estis listo de la ferioj de la direktoroj! Ankaŭ ĝiaj kostoj. Kaj jen estas la datoj, kiujn mi serĉis.

Do mi tuj presigis la tutan liston por mi mem kaj kaŝis ĝin.

Triumfe, mi sendis al la estro nur la datojn kiujn li volis scii. Dank'al la kato mi nun povus ĉantaĝi la tutan stabon. Ha-ha!

Trovis kaj esperantigis
Kolotov Nikolao [Kaĉug, Rusio]

Ĝentileco antaŭ ĉio

Foje mi estis oficevojaĝe en Turkmenio. Ni aferumis kun unu grava turkmen-estro, trinkis diversajn "fortajn trinkaĵojn". Tiutage al la oficejo de mia gastiganto venis telefaks-informo el Estonio, sed... en la estona lingvo. La turkmen-estro telefonis al la ĉef-policisto kaj petis lin trovi tradukiston el la estona. Baldaŭ estis trovita iu studento-estono, kiu tuj klarigis la aferon. Evidentiĝis, ke iu estonia komerca firmao deziras kontrakti kun la turkmen-estro pri la kotono. La studenton oni dankis kaj lasis esti libera.

Ni daŭrigis nian *te*-trinkadon. Post du horoj de afablaj konversacioj mia turkmen-estro vokis sekretarion kaj diktis respondon al la estona fakso. En sia respondo li dankis la eventualajn partnerojn pro la intereso al la turkmenaj varoj, aldonis siajn komercajn proponojn ktp...Kaj ordonis al la sekretario sendi tiun tekston reen al la estonia partnero.

Nur skribi la fakson li ordonis *en la turkmena lingvo*. Tiel, ke ankaŭ ili serĉu tradukiston...

Všivceva Tatjana [Miass, Rusio]

Naskiĝdato

Tiun historion rakontis unu mia kolego.



Foje li kun la amikoj festis naskiĝdaton. Komencis ili sabate, kaj finis jam dimanĉe. La amikoj disiris hejmen, kaj li, tute ebria, kuŝiĝis por dormi. Timante malfrui morgaŭ al la oficejo, li funkciigis la vekhorloĝon. Bona vekhorloĝo sonorvekis lin ĝuste je la sepa kaj duono. Li vestis sin kaj eliris. Alirante la enirejon de la oficejo, li sentis ian strangajon, sed kompreni — kian, ne sukcesis, ĉar plu restis iom ebria. La gardistino en la trairejo suspekteme rigardis lin kaj demandis tute ne afable:

- Kion vi volas, karulo?
- Mi venis por labori.
- Ĉu dimanĉe vespere?



Bill Thorne [Londono, Britio]

Tempo kaj homoj



elektis kaj esperantigis
Martin Ginette
[Saulxures/Moselotte, Francio]

Paroloj de Indianoj

Vi rimarkis, ke ĉiu aĵo, farita de Indiano estas cirkla.

Tiel estas ĉar la Universa Povo agas cirkle, kaj ĉiu aĵo emas esti cirkla.

En la pratempoj, kiam ni estis popolo forta kaj feliĉa, nia tuta povo venis de la sakrala cirklo de la nacio, kaj dum la tuta tempo de ĝia ne-detruo nia popolo prosperis.

La plenkreska arbo estis la vivanta centro de la cirklo, kaj la cirklo de la kvar kvaronoj nutris ĝin.

Oriento donis pacon kaj lumon, Sudo donis varmon, Okcidento donis pluvon kaj la Nordo, per ĝiaj malvarmaj fortaj ventoj, donis fortecon kaj harditecon.

Tiu kono venas al ni de la transmondo kun nia religio. Ĉio, kion faras la Universa Povo, fariĝas cirkle.

La ĉielo estas ronda, kaj mi aŭdis, ke la tero estas ronda kiel pilko, kaj ke ankaŭ la steloj estas tiaj.


La vento, en la pinto de ĝia furoro, ronde turniĝas.

Birdoj faras siajn nestojn rondaj, ĉar ili havas la saman religion kiel ni.

Suno levigas kaj subigas rondiranta. Luno agas same, kaj ambaŭ estas rondaj. Eĉ sezonoj faras grandan cirklon en ĝiaj ŝanĝiĝoj, kaj ĉiam revenas kie ili estis.

La vivo de la homo estas en cirklo, ekde infan-aĝo, kaj tiel estas por ĉiu aĵo en kiu la Povo moviĝas.

Niaj tendaj domoj estis rondaj, kiel la nestoj de birdoj, kaj ĉiam aranĝitaj cirkle...



bildo de **Kornjuĥina Anna** [Barnaul, Rusio]

bildo de **Kornjuĥina Anna** [Barnaul, Rusio]

Tempon sufiĉan prenu

el la libro "La aboco de tempoplanado"

Tempon sufiĉan prenu por labori, tio estas la prezo de la sukceso.

Tempon sufiĉan prenu por pripensi, tio estas fonto de la forto.

Tempon sufiĉan prenu por ludi, tio estas la sekreto de la juneco.

Tempon sufiĉan prenu por legi, tio estas la fundamento de la scio.

Tempon sufiĉan prenu por esti afabla, tio estas la ĉefa pordo de feliĉa estado.

Tempon sufiĉan prenu por revii, tio estas la vojo al la steloj.

Tempon sufiĉan prenu por ami, tio estas la vera vivoĝojo.

Tempon sufiĉan prenu por esti gaja, tio estas la muziko de la animo.

Proverboj pri tempo

Nokto kaj tago por bona ago.

La tempo eterna ĉiam estas moderna.

Tempo rapida kiel ĉevalo senbrida.

Venas saĝo en maljuna aĝo.

Bone tiu ridas, kiu ne rapidas.

Ĝodlaŭ prosperas, moŝgaŭ mizeros.

Pri pasinto rememoroj kvazaŭ floroj bonodozaj.

Tempo kaj ĵozo estas plej bona doktoro.

Ŝerco

Zujeva Margarita [Moskvo, Rusio]

— Kiomaĝa vi estas? — demandas kuracisto pacientinon.

— Mi devas kalkuli. Mi edziniĝis en la aĝo de 20 jaroj. Mia fianĉo tiam havis 40 jarojn. Mi estis je 2 fojoj pli juna ol li. Nun li havas 70 jarojn, do, mi sekve – 35.

Aforismo estas kvazaŭ mini-jupo: kurte kaj vidinte.

AFO[☹]RISMO[☺]J

Sukceso, bonŝanco...

Unufoje en la vivo
Fortuno nepre frapas la
pordon de ĉiu homo, sed
tiu nemalofte troviĝas
tiumomente en la
proksima drinkejo kaj ne
aŭdas ĝian frapon.

M. Tven

Sukceso estas konstanta
preteco uzi ŝancon.

F. Doubi

Malfortaj homoj kredas
je bonŝanco, fortaj – je
rezono kaj rezulto.

Emerson

Ĉiuj atendas gajni en
loterio, eĉ tiuj, kiuj tute
ne aĉetas loteriajn
biletojn.

A. Slonimskij

Estadas, ke ĉio
sukcesas. Ne timu, tio
baldaŭ pasos.

J. Renar

Malsukcesoj de aliuloj
ŝajnas al ni tute naturaj,
sed kial malsukcesas ni
mem – ni ne povas
kompreni.

M. E-Eŝenbah

Homoj pli ofte
kapitulacas, ol spertas
malvenkon.

Henry Ford

Se vi ne atingis sukceson
tuj, provu ankoraŭ kaj
ankoraŭ foje. Kaj poste
trankviliĝu kaj fartu por
via plezuro.

W. Filds

Vŝivceva Tatjana [Miass, Rusio]

La deziro vivi nur per sia saĝo
ĉiam stumblas ĉe la manko de
la lasta.

popola saĝo

Eventoj okazas mem malgraŭ
ilia prisilentado.

Sofokl

Estu bela, se vi povas; estu
saĝa, se vi volas; sed estu
atenta — tio nepras.

popola saĝo

Kun bonaj esperoj adiaŭo ĉiam
estas festo.

banalajo

Jakovleva Jelena, [Arhangelsk, Rusio]

Malbona estas tia konsilanto,
kiu siavice ne aŭskultas
konsilojn de la aliaj.

Gejms Kuper

Fratinoj **Gansen V.** kaj **O.**


Helpante al la alia supreniri
monton ni mem proksimiĝas al
la supro.

Norman Ŝvarckopf

Oni parolas, ke per la mono
eblas aĉeti ĉion, sed fakte estas
ne tiel.

Oni povas aĉeti nutraĵon, sed
ne apetiton. La medikamenton,
sed ne la sanon. La scion, sed
ne la saĝecon. La eksteran
brilon, sed ne belecon. La
gajecon, sed ne ĝojon. La
konatojn, sed ne amikojn. La
komplezon, sed ne fidelon...

Anne Garborg



Kornjuĥina Anna [Barnaul, Rusio]

Por porti okulvitron bezonatas
ne nur esti saĝa, sed ankaŭ
malbone vidi.

Paĥomov Sergeo [Kirov, Rusio]

Kiuj havas — tiuj pravas.

Ne la vivo estas multekosta,
sed ni estas mizeraj.

Se virino ekvolos, ŝi forprenos
de la viro ĉion, eĉ familinomon.

Laĉifin Alekseo [Sosjva, Rusio]

La vortojn ni bezonas ankaŭ
por kaŝi niajn pensojn.

Voltero

Zujeva Margarita [Moskvo, Rusio]

De vera kuracisto malsanulo
povas perdi vivon, sed neniam
– esperon.

Yalen

Homo havas 2 ĝojojn: unu —
en juneco eliri el hejmo, alian
— en maljuneco reveni hejmon.

M. Priŝvin

Preterlasinta bonŝanco malofte
revenas.

Sir




Paĥomov Sergeo

[Kirov, Rusio]

Ĉu vi povas imagi – hodiaŭ nokte mi vidis sonĝon en eksterlanda lingvo!
— Do, vi bezonas dormi kun interpretistino.

En la policejo deĵoras policisto. Li legas libron. De tempo al tempo li ekkrias:

— Diablo prenu! Ne povas esti! Ho!.. Ba! Jen la afero! Panjo mia!
Poste li ekstaras, jetas la libron sur tablon kaj diras:
— Nu, absolute nekredblas!
Preterpasanta kolego demandas:
— Kion vi legis, Johnson?
— La ortografian vortaron.



Jakovleva Elena

[Arĥangelsk, Rusio]

Du fantomoj nerapide promenas laŭ malnova kastelo. Subite knaras planko kaj unu el la fantomoj ektimas. La alia trankviligas ĝin:
— Ĉu efektive vi kredas je tiu fabelo pri vivo?

Loŝmanov Anton

[Komsomolsk-sur-Amuro, Rusio]

La juna poeto:
— Ĉu mi povas paroli kun la redaktoro?
— Bedaŭrinde li forestas.
— Kiel forestas? Mi jus vidis lin en la fenestro.
— Jes, sed li ekvidis vin pli frue.

Pri kuracistoj kaj pacientoj

kolektis kaj esperantigis: **Zujeva Margarita** [Moskvo], **Gansen V. kaj O.** [Karelio], **Jakovleva Elena** [Arĥangelsk] el Rusio

— Mi deklaras al vi kiel kuracisto – estas nenio danĝera. Mi mem havas tiun malsanon.
— Jes. Sed vi havas alian kuraciston!

— S-ro kuracisto, ĉu vi al mi post la akcidento alkudris la kapon?
— Ĉu ĝi estas malbone alkudrita?
— Bone, bone, sed tio estas ne mia kapo.

— S-ro kuracisto, mia aŭdkapablo ege malboniĝis.
— Ĉu vi fumas?
— Jes.
— Ĉu vi drinkas?
— Jes.
— Kaj kiel pri virinoj?
— Jes.
— Nepre necesas ĉesi ĉion.
— Ĉesi ĉion? Nur por bone aŭdi?
Neniam!

Kuracisto demandas pacieron:

— Ĉu vi plenumis mian instrukcion fumi ne pli ol dek cigaredojn dum tago?
— Certe jes.
— Tiam mi ne komprenas kial via sanstato ne pliboniĝas.
— Eble pro tio, ke ĝis via instrukcio mi ĝenerale ne fumis.



Kuracisto koleras al sia medicina flegistino:

— Vi denove donis al paciento recepton de torto anstataŭ mia preskribo de kuraciloj!

La malsanulo finis la kurson de kuracado en psikiatria hospitalo. La psikiatro diras al li resumajn vortojn.

— Certe vi memoras, ke vi havis altrudan ideon — al vi ŝajnis, ke vi estas grajno de helianto. Nun, dank'al Dio, vi komprenas, ke vi ne estas la grajno.
— Pardonu, doktoro, sed ĉu la koko scias pri tio?

Virino en apoteko:

— Ĉu vi havas malmultekostan efikan rimedon por maldikiĝo?
— Jes. Plastron.
— Kaj al kiu loko necesas ĝin glui?
— Al la buŝo.

Pentris sur la paĝo

Kornjĥina Anna

[Barnaul, Rusio]



Bill Thorne
RIMARO

ATO

abato
advokato
aerostato
agregato
akrobato
aristokrato
aŭtokrato
blato
boato
dato
debato
demokrato
diplomato
drato
fato
flato
frato
fregato
kandidato
kato
klimato
kravato
kvadrato
magnato
mandato
monato
muskato
pato
plato
rato
salato
stato
strato
tokato
tomato
traktato
vato

ANTO

banto
elefanto
fanto
ganto
garanto
giganto
intendantato
kanto
pedanto

Zavjalova Tatjana
[Arhangelsk, Rusio]

El kajako al hamako

Inspire de Bill Thorne

Navigas la kajako
en tre profunda flako.
Malseka iĝis mia jakto.
Kaj mi rapidas al bivako,
al la hamako.
(ĉu kun konjako?)

*

Havas mi demandon
pri miraklaj landoj.
Kie estas landoj
kun sukeraj strandoj?

Sur arboj kreskas kandoj
de kolosaj grandoj.

Ordonos mi komandon
navigi al la landoj.

*

Falis generalo
de sia ĉevalo.
Estis skandalo
en tuta kvartalo.

Kiu moralo
el tiu falo?

Ne donos medalon
el ora metalo
al sia ĉevalo
la generalo.

*


Desegnas mia imago
de mia vivo zigzagon —
la sunan tagon
ĉe bela lago.

*

Nova amo
estas balzamo
post la dramo

Demandoj ŝercaj — respondoj inversaj

1. Per kiu mano pli bonas miksi sukron en teo-glaso?
2. Kio apartenas al vi, sed plej ofte ĝin uzas aliaj?
3. Kuris vintre skiisto, sur li sidis muŝo. Kun kiu rapideco veturis la muŝo?
4. Kial la birdoj flugas suden aŭtune?
5. Kio pleniĝas matene kaj malpleniĝas vespere?
6. Kion ĉiuj homoj sur la tero faras samtempe?
7. Kiel sendanĝere forsalti de la 10-metra ŝtupetaro?
8. Kio iĝas pli granda, se ĝin "meti sur la kapon"?
9. En unu familio estas 2 patroj kaj 2 filoj. Kiom da viroj estas en la familio?
10. Kio parolas en ĉiuj lingvoj?



Perevalov Jurij [Lesnoj, Rusio]

Verkado de proverboj — trejnado por cerboj

En KOMENCANTO - 2-2001 ni lanĉis rubrikon "El popola cerbo venas la proverbo". Unu el la taskoj estis finverki la proverbojn, kiuj estas vaste konataj kaj multaj eĉ Zamenhof-devenaj. Jen estas la vicaj variantoj.

Komenco de proverbo	variante de S. Paŝomov
Ne doloras frapo	se sub kasko estas kapo.
Ne ŝovu nazon	en Esperanto-bazon.
Tempo estas valoro	ne tro rapidu koro!
La dorm' estas bona	sen son' magnetofona.
Kiu frue leviĝas	por dormuloj obstaklo iĝas.
Inter generaloj	ĉiam estas por milito kialoj.
Ŝatata laboro	estas lav' de oro.
Komenco bona	enhavo monotona.
Vigla saĝo	kondukas al kaĝo
Al ĉiu besto	necesas karesa gesto

Invitoj kaj informoj

Tutmonda Fabelkonkurso

invitas infanojn verki

Paatalo-Instituto estas kultura-literatura edukcentro en Taivalkoski, Norda Finnlando. Inter la agadoj de la instituto estas fabelkonkurso por finnaj infanoj. En 2000 la Instituto eksperimente aldonis al la konkurso Esperantlingvan branĉon. Pro bonaj spertoj ĝi estis ripetita en 2001, kiam UEA aŭspiciis ĝin kaj donacis libropremiojn al la gajnintoj. Finnaj gazetoj multe raportis pri la Esperanta branĉo.

Ankaŭ ĉi-jare la konkurso havas Esperanto-branĉon, kiu denove okazos sub aŭspicio de UEA. Rajtas partopreni infanoj el la tuta mondo, kiuj scipovas aŭ ankoraŭ studas Esperanton.

En la konkurso estas tri kategorioj: A: infanoj ĝis 9-jaraj; B: 10-11 jaraj; C: 12-14 jaraj.

La konkursaĵoj povas esti verkitaj de individuaj infanoj aŭ de grupoj (ekz. lernejoj klasoj). Individuaj kaj grupaj konkursaĵoj estos taksitaj aparte. La longeco de la konkursaĵoj ne estas fiksita.

La ĉefa celo de la konkurso estas, ke geknaboj interesiĝu pri la uzado de la lernita lingvo, daŭrigu sian bonan hobion kaj ekzercu sian kreivon.

La limdato estas 20-an de septembro. Oni adresu konkursaĵojn al:

Paatalo-Instituto, PL 39, FI-93401, Taivalkoski, Finnlando

Oni skribu sur koverto la vorton "Fabelkonkurso", uzu pseŭdonimon kaj menciu, ĉu la konkursanto estas grupo aŭ unuopulo. La nomo, adreso, naskiĝdato kaj (se eble) telefonnumero aŭ retadreso de la konkursanto estu en aparta koverto.

Pli da informoj oni povas ricevi de la komisiito de la Instituto pri la konkurso:

Aini Vaaraniemi, Vaarajarventie 26 A, FI-93590 Vanhala, Finnlando.

aini.vaaraniemi@pp.inet.fi

La hejmpaĝo de la Instituto estas

www.taivalkoski.fi/paatalo-instituutti

La direktoro de la Instituto estas

Osmo Buller.

Invitas Rusio

OkSEJT-42

Tradicia ĉiujara tendaro okazos apud Niĵnij Novgorod 28 jul - 07 aŭg 2002. Ĉi-jare ni festos 115-jariĝon de la lingvo Esperanto kaj Rusia E-movado. La ĉefa ideo: "Ĉiuj estas diversaj, ĉiuj estas unikaj". Kiel ĉiam bunta kaj interesa programo, ekskursoj al lokaj vidindaĵoj. La bazejo situas en ekologie pura kaj pitoreska loko surborde de la rivero Serjoĵa, je dudekminuta distanco troviĝas la lago Svetloje. Kontaktu la organizantojn ĉe *estro@nifti.unn.ru* aŭ *etulinka@mail.ru*

Renkontiĝo de Amikoj

RA-2 okazos apud Novosibirsko dum la lasta semajno de junio 2002. La organizantoj skribas: "Ni volas, ke lernado de Esperanto donacu al vi plezuron kaj plibonigu vian humoron. Por ni Esperanto estas pli ol lingvo..." Unu tagnokto kun trifoja mango dum RA kostos proksimume 150 rublojn. Pliajn detalojn:

www.NEKmovado.narod.ru

Kontaktadreso: 630078, Novosibirsk-78, p/k 107; rete: *ra2@pochtamt.ru*

Ivanova

Esperanto-Renkontiĝo

IvERo-3 okazos 06-14 julio 2002 en Ĉernci, (Ivanova regiono). Organizanto – Ivanova Esperanto-Klubo, unu el la plej malnovaj E-klubo de la mondo. IvERo-3 invitas mezaĝajn geesperantistojn, kiuj delonge aktivis en la movado kaj dezirus ripoziti en la naturo en amika rondo, ĝui E-etoson. Por junularo kaj infanoj – speciala programo. Pri la detaloj:

Andreo Obrezkov, 153000, Ivanovo, str. 8-ja Sosnevskaĵa 84;

rete: *obran@rambler.ru*

Irina Galicina: 153 Ivanovo,

str. Kudrjaĵova 82A – 37;

rete: *irga67@yahoo.com*

Rusiaj E-Tagoj

Rusia Esperantista Unio invitas ĉiujn al Rusiaj Esperanto-Tagoj (RET-02). La aranĝo okazos 15-25-an de aŭgusto 2002 apud la urbo Kovrov (Vladimira reg.).

Dum jardekoj la lokomotivo de nialanda E-movado estis la junulara movado, kiu aranĝis la ĉefajn somerajn aranĝojn – OkSEJT kaj OrSEJT. Sed kien veturu la iamaj aktivuloj de SEJM, kiuj ne plu estas en la junulara vivetapo, sed daŭre estas aktivaj, amikemaj, kunvenemaj kaj esperantemaj?

Por kiu estas la renkontiĝo? — Por ĉiuj, kiuj volas pasigi dek tagojn en Esperantujo.

Kio okazos en la programo? — La programo baze sekvos SEJTajn principojn, okazos E-kursoj, seminarioj, prelegoj, komunaj festoj, ekskursoj k.t.p.

En la arta programo: surprizo! Finfine al ni venos *Ĵomart Amzeev kaj Nataŝa Gerlah!* Espereble partoprenos ankaŭ aliaj konataj rusiaj E-artistoj.

Kie okazos RET? — Ĝi pasos en nekredible ĉarma kaj malmultekosta bazejo apud Kovrov, Vladimira regiono (kie pasintjare okazis SEJT).

En la organiza teamo: REU-aktivuloj Andrej Grigorjevskij, Garik Kokolija, Irina Gonĉarova kaj multaj aliaj.

Kiel aliĝi? — Petu aliĝilon ĉe: 105318, Moskvo, a/ĵa 57, "RET-02". Kontakteblecoj: Andrej Grigorjevskij: andreo@mailru.com, tel: (83536) 59856

Garik Kokolija — garik@mitino.ptt.ru (095) 567007. Retpaĝo de RET-02 aperos en www.andreo.mailru.com/ret/

— — — demandu vin:



Ĉi vi parolas en

BONAJN LINGVOJN

RET02

estas respondo

Rusiaj Esperanto-Tagoj

Rusiaj Esperanto-Tagoj
RET-02
Kovrov, Vladimira reĝo-
15-25.08.2002

Anoncetoj

Informoj

Korespondu!

Ĉiu kadro kostas 10 rublojn por rusianoj aŭ 2 IRK por eksterlandanoj. Por abonantoj de "K" - senpage.

32 jara malliberulo ŝatas korespondi kun aliaj esperantistoj por plibonigi sian Esperanton.

Stephen W. Moore
P.O.Box 26020
12719-045, Beaumont,
TX 77720-6020
USA

E-grupo vendas tri poŝtkartojn el Brazilo, senditajn al franca esperantisto inter jaroj 1900 -1920. Prezentu viajn prezojn al:

Guy Dauphin
5 bis rue Hauvy,
10300 Ste Savine,
Francio
g.d.dauphin@wanadoo.fr

Komencanto, deziras korespondi kun eksterlandanoj por plibonigi sian Esperanton.

Ricardo Alves de Oliveira
Jose Alexandre de Farias
471, Bancarios Joao Pessoa,
(Paraiba), BR-58051-550
Brazilo

74 jara inĝeniero volas korespondi por plibonigi sian Esperanton kaj por koni novajn kulturojn. Intereso: poŝtmarkoj, klasika muziko, kuracplantoj, ŝako.

Ardell Shirey
1106 Rebecca Ln,
Humble, TX 77338,
USA

Ji Yingeng. 65 jara emerita instruisto de la rusa kaj angla lingvoj, kaj *Cao Guigeng*, emerita oficistino, membroj de Pasporta Servo, volas aĉeti novan kaj pli grandan loĝejon. Subvenciantoj povos rekompence loĝi kaj kunmanĝi senpage en nia hejmo, tiom longe kiom ili volos, dum ili estos en Shanghai.


s-ro *Ji Yingeng*
s-ino *Cao Guigeng*
No. 8 lane 57 Xinzha
Road, Shanghai,
Ĉinio

Francaj ĝemeloj 6-jaraj volas korespondi: 1. *Luca*, interŝanĝas etikedojn de mineral-akvo kontraŭ PM, PK aŭ moneroj de Francio. 2. *Lino*, interŝanĝas etikedojn de olivoleo kaj biero(!) kontraŭ PM, PK, aŭ io alia.

Luca & Lino Basso
9, Rue Doumer,
F-68920, Wintzenheim,
Francio

Deziras korespondi tutmonde pri diversaj temoj (30 ja)

Elena Jakovleva
Partizanskaja,
51-1-196
Arhangelsk
RU-163059
Rusio



**Santi
Elena Bullo**

[Mestre, Italio]

KOMENCANTO 2002

famaj esperantistoj
historio de E-literaturo
gramatiko serloze kaj ŝerce
amuzaj rakontoj
proverboj, aforismoj
anekdotoj
adreso
multaj multaj bildoj

Turkdevena vidvino ŝatus konatiĝi kun usonaj esperantistoj.

Heshmat Faraji,
4647 Willis Av # 220,
Sherman Oaks
CA 91403,
USA

Mi estas 60-jara polino, instruisto de la germana lingvo kaj deziras korespondi serioze kaj regule kun samaĝa esperantisto el Brazilo pri fremdlingvoj, kulturo, historio, literaturo, ĝardenado kaj turismo.

Stanjo Stanistavva

Stanislawa Krzywdznska,
ul Sikorskiego 30,
33-300 Nowy Sacz,
Pollando

Mi deziras korespondi kun belaj fraŭlinoj 25-40 jaraĝaj. Bonvolu sendi al mi vian foton. Dankon.

Larry Lowe
83222-079,
P.O.Box 26020
Beaumont,
TX - 77720-6020
USA

Bonvolu noti novan retroŝtan adreson de KOMENCANTO

komencanto@r66.ru

vial mesaĝoj, verkoj kaj leteroj estas ĉiam bonvenaj !

